

3. Por la nocio  
**Senmotora vagono kun kondukistejo por observi la vojon kaj regi la trakciilon**

niaj kunlaborantoj favorigas jenajn terminojn:

- 3 kolegoj **gvidvagono** (*gvidi 2 = Direkti la movon al la celo.*)
- 3 kolegoj **stirvagono** (*stiri = Direkti veturilon.*)
- 1 kolego **pilotvagono** (*piloto = Maristo aŭ ano de aviadila personaro,...*)
- -1 kolego **regvagono** (*regi 6 = Ekigi, reguli kaj haltigi la funkciadon de maŝino.*)

Tiu termino, kiun ni en Budapest decidis, nepre estu elemento de kunmeto por nomi vagonaron, trajn(komplet)on aŭ trafikon, funkciantan helpe de tia speciala vagono (7134, 9165, 5442). Tamen 1-kolego proponas konservi **navetrajno** (*naveto = Malgranda, ordinare ligna, cigārforma ilo por teksmaŝino, ...*) por la nocio 9165.

4. Por la nocio 5837  
**Kurtkurso trajno por interligi du trafiknodojn aŭ trafiknodon kun alia centro** (ekzemple flughavenon kun urbocentro)


2 kolegoj proponas **naveda trajno** (laŭ nova PIV: *naveda = Ir-reira.*), kvankam unuopa trajno veturas nur unudirekte; la sekva inversdirekta trajno jam estas alia (kun alia trajnnumero). Restas la propono en TeKu 109: **trajno de interkonduka trafiko**. En Aalborg ni decidis por 11137: **interkonduka trafiko** (vidu TeKu 105).

En **pasagertransporto** preskaŭ ĉiu trafikrimedo estas ira-reira. La malo, do rondiro, estas tre malofta escepto (kelkaj bus-, tramvoj- kaj metrolinioj). Kontraste al tio, cirkulado de **varvagonoj** normalkaze estas libera, do sen fiksita kurso. Nocioj koncerne iran-reiran trafikon estas bezonataj, se specialaj unuopaj varvagonoj aŭ senmodifataj vagonaroj por pezaj amasvaroj (karbo, oleo ktp) ripete iras-reiras inter du certaj lokoj. Do ni pripensu taŭgan adjektivon por tiaj varvagon(ar)o kaj vartrafiko, aŭ **naveda** aŭ **ira-reira** aŭ pli bonan.

Interesan kaj fruktodonan diskutadon en Budapest

esperas *Heinz Hoffmann.*

**Kunportu la Terminaran Kurieron al la kongreso!**



## Terminara Kuriero

TeKu 110

Aprilo 2000

### Komunikilo de Terminara Sekcio de IFEF

Sekretario: D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2, DE-01445 Radebeul  
Telefona: +49 351 8385877 Retadreso: IFEF.B90GR-mei@t-online.de

### Terminologia Grupo ĉe UIC kunsidis

6-an de aprilo 2000 okazis 2-a kunsido de Terminologia Grupo ĉe Internacia Fervojunio (UIC) en Paris. Ĝin partoprenis ankaŭ la sekretario de Terminara Sekcio ĉe IFEF kiel oficiala grupomembro. Jen koncize pri gravaj traktoj:

#### Pri 3-a terminareldono el la datumbanko „RailLexic“

Tiu eldono aperos en 3 versioj:

- libroj:** Ekde nun eblas mendi per formularo plurlingvajn terminarojn. Produktorajton sole havas Hungaraj Ŝtatafervojoj (MÁV). Oni presos deziratan lingvokombinon, se minimume 50 ekzempleroj estas menditaj.
- kompaktaj disketoj „CD-ROM“:** UIC klopodas liveri tiajn disketojn en junio 2000.
- nova versio en Interreto:** Verŝajne fine de aprilo 2000 aperos informo pri la retadreso.

Versio sur pluraj normalaj disketoj ne plu estos kreata.

#### Estonta laboro

UIC decidis, dum kelkaj jaroj ne pliampleksigi la datumbankon je novaj nocioj. La tempo estu ĉefe uzata por prilabori unuopajn fakojn laŭ reguloj de Internacia Organizo por Normigo (ISO). La unua traktota fakoj koncernas ĝeneralajn nociojn pri fervojaj veturiloj (MT40). En la kunsido oni fondis 8-kapan kolektivon por trakti la temon. Al ĝi apartenas ankaŭ la kunlaboranto de IFEF.

Sekve ŝanĝiĝos la taskoj por nia Terminara Sekcio: Laŭ unuaj ideoj la kolektivo MT40 kreas laŭsistemajn labordifinojn en angla, franca, germana kaj Esperanto-lingvoj. Surbaze de tiuj difinoj, naciaj fakuloj - ankaŭ niaj terminaraj kunlaborantoj - estos demandataj pri konvenaj naciaj terminoj kaj pri devioj en naciaj difinoj. La kolektivo MT40 analizos la respondojn. Poste UIC decidis pri la koncernaj RailLexic-nocioj kaj -terminoj en angla, franca kaj germana lingvoj. Finafine ni tradukos ĉi ĉion en Esperanton aŭ konfirmos jam ekzistantajn solvojn.

Detaloj estos traktataj en la Budapesta kongreso.

*En nia Terminara Sekcio ankoraŭ ne kunlaboras bulgarioj kaj kroatoj. En la UIC-grupo kunlaboras kroatinano. Por serbokroata lingvo, oni planas kirilliteran kaj latinliteran versiojn.*

## Tradukoj el la angla lingvo

Kolegoj Emil Tudorache kaj Jan Uldal Niemann esprimis pretecon traduki anglalingvaj UIC-informojn en Esperanton. Ambaŭ sekcianoj meritas nian sinceran dankon.

## Respondoj al terminaj demandoj en TeKu 109

Siajn opiniojn esprimis kolegoj el Aŭstrio, Ĉeĥio, Danio, Germanio, Jugoslavio, Italio, Rumanio. Multan dankon pro la kunlaboro.

1. Montrigis, ke la plej-komplika problemo troviĝas en la nocio kun jena difino, iom pli klara ol en TeKu 109:

**Tutaĵo de pluraj vagonoj kunligitaj**


- aŭ per firma (kompaktiga) kuplilo (bildo 1)

- aŭ kiel partveturiloj (rulekipaĵo ne po vagonkesto) per artikoj (bildo 2)


tiel, ke disigo kaj kunigo eblas nur en metiejo, do ne fare de manovristo, sekve ke unuopa vagono ne povas sole funkcii en trafiko.

En la sekvaj bildoj sole gravas la diferencaj ligprincipoj inter vagonoj. La ankaŭ bildigitaj specoj de vagonkesto (por aŭto- aŭ pasaĝertransporto en du etaĝoj) ne tuŝas la traktatan temon.

bildo 1



bildo 2



En nuna RailLexic la franclingvaj originaloj 3128 *élément indéformable*, 7127 *rame à éléments multiples* kaj 7130 *rame indéformable* rilatas al la koncerna nocio. La Esperanto-tradukoj *konstantkonsista vagonaro* kaj *plurelementa trajno* ne bone reprezentas tiun nocion. Elektante la pli taŭgan terminon, 9 el 13 kolegoj preferis *vagonkombinaĵo* al *vagonligiĵo*. Laŭ PIV, *kombin...* akcentas difinitan ordon; *lig...* akcentas malhelpon je disigo.

Nia kolego Jan Werner, aŭtoro de la broŝuro „Terminologia kurso“, rekomendas eviti la sufikson *-af-*, se la nura finaĵo *-o* ne kaŭzas miskomprenon. Tiu kurta substantivigo de verba radiko estas unuflanke pli manipulebla en abundaj cirkostancoj kaj kunmetoj, aliaflanke indiferenta, ĉu temas pri ago aŭ pri rezulto. Sekve en Budapeŝt ni diskutu, ĉu la vortoj *vagonkombino* aŭ *vagonligo* sufiĉe klare esprimas objekton, do rezulton de ago laŭ la difinita nocio. De kelkaj kolegoj venis novaj proponoj, nome *vagonagrego* (*agregi = Kunigi per nekemiaj fortoj.*), *vagonfirmkuplaĵo* (ekskludas objektojn laŭ bildo 2), *vagonkompakto* (*kompakta 1 = Densa kaj nedisiĝema.*) kaj *vagonskipo* (*skipo = Grupo da laboristoj, kune laborantaj en difinita nombro super unu sama tasko.*). Ni pripensu, ĉu kelkaj esprimoj kaŭzas miskomprenon, ekzemple ĉu *vagonligo* povas esti miskomprenata kiel plurlanda organizaĵo por komuna vagonuzo, aŭ ĉu *vagonskipo* povas esti miskomprenata kiel laborgrupo por ripari aŭ purigi vagonojn.

2. Por la nocio

**Tutaĵo de veturiloj de trajno**

en TeKu 109 estas menciita la termino *trajnunuo* laŭ kelkaj artikoloj de kolego Tomišek. Alvenis gravaj diroj kontraŭ tiu esprimo, kiu ĝis nun ne troviĝas en Esperanto-vortaro. Sole danaj kolegoj subtenas ĝin. Rumanaj kolegoj proponas *trajnkombinaĵo*, kvankam la nocio inkludu ankaŭ solan lokomotivon aŭ solan motorvagonon kiel trajnon. Kolegoj Ludoviko Sekereš kaj Jan Werner proponas *trajnkompleto* (*kompleta = Tia, ke al ĝi mankas neniu el la eroj, kiuj devas ĝin konsistigi.*).

Tiu lasta propono certe estas favore diskutinda. Tamen la nocio estas nur malofte bezonata, ekzemple por esprimi, ke en trajnkursfina stacio, vagonaro kun lokomotivo de alveninta trajno restas senmodifa por la sekva, inversdirekta trajno. En tiu konekso oportunas listigi eblajn ekvivalentojn por manovrado:

<b>trajntrafiko</b>	<=>	<b>manovrado</b>
9018 trajno	<=>	..... manovro
5821 trajnveturo	<=>	1677 manovra veturo
2106 trajnkompleto	<=>	7120 manovrokompleto
7119 vagonaro	<=>	2153 vagongrupo

Se la gekolegoj en Budapeŝt jesos pri la proponoj, en 4-a eldono de RailLexic aperos korektoj por 2106 de *trajnveturo (statistike)* al *trajnkompleto*, kaj por 7120 de *manovradunuo* al *manovrokompleto*.

